

La Apostolaj Patroj

Enkonduko

La Apostolaj Patroj

Αποστολικοί Πατέρες

PATRES APOSTOLICI

Enkonduko de Gerrit Isai Berveling

En foraj tempoj, kelkaj homoj komencis kompili iaspecajn krestomatiojn el tekstoj, kiujn ili opiniis tre gravaj.

Malnova Testamento

En la Hebrea tradicio unue formiĝis la Tora¹, kiun foje oni ankaŭ nomas la Kvinlibro Mosea aŭ Pentateŭho. Ekzakte kiam estiĝis ĝia *kanonigo*, neniuj centprocente scias, sed tradicie oni ligas tion al la agado de Ezra². Modernaj fakuloj ofte diras, ke tempe de Ezra oni kanonigis la Toraon. Antaŭ 200 a. Kr. laŭdire la bloko de la t. n. Profetoj estis kanonigita: tio konsistas el du grupoj da tekstoj, la t. n. Fruaj Profetaj libroj (Josuo, Juĝistoj, Samuel kaj Reĝoj) kaj la Postaj Profetoj (Jesaja, Jeremia, Jeĥezkel kaj la Profeta Dekdulibro). Relative tradicia krome estas la opinio, ke la

¹ Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj kaj Readmono.

² Vidu en 4 Ezra 14 (en *La Duakanonaj Libroj*, Vol. 3).

bloko de la t. n. Skriboj estis kanonigita ĉ. 100 p. Kr. (Ijob, Psalmoj, Sentencoj, Predikanto, Alta Kanto, Daniel, Kroniko, Ezra (+ Neĥemja) kaj Ester).

La Hebrea kanono, tiel formita, konsistas el Tora, Profetoj kaj Skriboj (Tora', Nebiim' kaj Ĥetubim' = TeNaĤ). La lasta stadio de la Hebrea kanonigo, miasupoze, estiĝis reage al la ĉiam pli abunde disvolviĝanta verkada agado de la sekvantoj de Jesuo: estiĝis tiom da leteroj de apostoloj, evangelioj ktp, ke la rabenoj sin sentis kvazaŭ devigitaj konstrui ian «Muron» kontraŭ tiu minacanta inundo. Ĉe tio ili radikale fortranĉis la ne-Hebreajn librojn kaj eĉ la Saĝecon de Jesuo Sirah, kiu origine ja estis verkita Hebre. La limon oni metis ĉe la agado de la lastaj ĝenerale rekonataj profetoj. La kvar libroj Makabeoj kaj Jesuo Sirah per tiu limigo aŭtomate forfalis. En Aleksandrio Egipta formiĝis Helena traduko de la tuta Hebrea Biblia tradicio, inkluzive de la poste ne kanonigitaj. Tiun tradukon ni nomas la Septuaginto (LXX).

Helena kulturo

En la sama Aleksandrio Egipta, ĉe la mondfama biblioteko, oni kolektis literaturaĵojn kaj sciencajn verkojn en la Helena, se eble el la tuta konata mondo.

La Aleksandriaj bibliotekistoj kaj ekzegezistoj kompilis kaj prikomentis la grandajn kanonojn de la Helena literaturo. Dank' al tiu laboro oni science «purigis» kaj transdonis kopiante la tekstojn de Homero, de la fruaj lirikistoj, formis kanonojn de po sep tragedioj de Eŝilo, Sofoklo kaj Eŭripido, ktp ktp. Sed kontraste al la Hebrea popolo, la Helenoj – politike, dialekte kaj filozofie tre dividitaj – neniam alprenis iun kanonon, kiu leĝe, etike kaj religie efikus kiel la Hebrea Biblio.

Nova Testamento

Kristanismo transprenis la Septuaginton de la Aleksandria tradicio, kaj formis sian propran kanonon pri tipe Kristanaj tekstoj: la Nova Testamento.

Sed ĉe tiu historio pluraj tekstoj malaperis, kiuj laŭ pluraj movadoj aŭ tendencoj – foje konsiderataj kiel herezaj de la plimulto – tamen havis gravecon. Kelkaj dumtempe restis kvazaŭ rande de kanoniĝo, sed fine tamen ne povis eniri «inter la Muron» de kanoneco. Aliaj el la fruaj tekstoj neniam eĉ pretendis fariĝi kanonaj, sed tamen restis legataj en frukristanaj rondoj.

Ankaŭ ekster la Eŭropa kulturejo

Kompreneble ne nur en la Hebrea kaj Helena lingvejoj jam tre frue oni kompilis grave influajn kolektaĵojn da tekstoj. Same okazis en la Ĉina kaj en aliaj kulturoj, sed pri tiuj mi ne studis, do ne serioze povas verki. Espereble ankaŭ en ilia kulturejo oni verkos pri tio.

Ekster la Muroj³

El la amaso da fruakristanaj tekstoj kelkajn de la plej gravaj vi renkontos ĉe la nuna entrepreno. *La Apostolaj Patroj* estas la tradicia indiko, kiun unua uzis J. B. Cotelier en 1672 por sia eldono Latinlingva de *Barnabas, Clemens, Hermas, Ignatius kaj Polycarpus*. Poste al tiu tekstaro oni aldonis kelkajn kromajn tekstojn el la plej frua kristanismo. Tiun kolektaĵon en la nuna eldono ni prezentas al nia klera publiko.

Jam tre frue post mia Esperantistiĝo mi interesiĝis pri ĉi tiu entrepreno, sed daŭre intervenis aliaj taskoj⁴. Nun do fine atingas sian kompletigon la laboro, kiun siatempe ankoraŭ juna mi komencis per la *Didaĥeo*, kiu estis mia unua aperinta tradukaĵo en Esperanto (IABO, Ravenna, 1979).

Gerrit Isai Berveling

³ Tiun origine intencitan titolon mi menciis en *Konciza historio de Kristanismo*, p. 16.

⁴ Vidu artikolon en *La Gazeto*.

Broŝuroj en la serio Voĉoj Kristanaj⁵:

- 4 La letero al Diogneto
La fragmento de Kvadrato
- 32 Hermas: La Paŝtisto
- 33 Didaĥeo
aŭ Instruo de la dek du Apostoloj
- 34 Klemento de Romo: Leteroj
La martiriĝo de Klemento
- 35 Ignacio el Antioĥio: Leteroj
La martiriĝo de Ignacio
- 36 Polikarpo el Smirno: La letero al la Filipianoj
- 37 La Letero de Barnabas
- 38 Papias el Hierapolo: Fragmentoj

⁵ planitaj por 2020. Jam nun interrete ĉi tie en KRISTANAJ FONTOJ (fontoj.net > Trezorejo > Gravaj religiaj tekstoj).

Originaloj en la Interreto^{6 7}:

Distribu-paĝoj:

Greka Vikifontaro:

https://el.wikisource.org/wiki/Κατηγορία:Ελληνική_πατρολογία

Bibliothek der Kirchenväter, Universitato de Friburgo, Svislando:

<https://bkv.unifr.ch/works>

Christian Classics Ethereal Library (CCEL):

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/fathers-title.htm>

Detale:

Diogneto:

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/diognetus.htm>

Kvadrato (Eusebius, Hist. Eccl.):

<https://bkv.unifr.ch/works/147/versions/363/divisions/122876>

<http://www.perseus.tufts.edu/hopper/text?doc=Perseus%3Atext%3a2008.01.0640>

⁶ Lastfoje kontrolitaj: 2020-04-26.

⁷ La retpaĝoj de www.ccel.org ne ĉiam alireblas.

Hermas:

https://el.wikisource.org/wiki/Ο_Ποιμήν_του_Ερμά

<https://bkv.unifr.ch/works/102/versions/118/divisions/34999>

https://www.ccel.org/1/lake/fathers/shepherd_a.htm

Didache:

https://el.wikisource.org/wiki/Διδαχή_των_Δώδεκα_Αποστόλων

<https://bkv.unifr.ch/works/2/versions/4/divisions>

https://www.hs-augsburg.de/~harsch/graeca/Chronologia/S_post02/Didache/did_text.html

<https://kreuzgang.org/pdf/didache.pdf> (Germana kaj senakcente Greka)

Klemento:

https://el.wikisource.org/wiki/Κλήμεντος_προς_Κορινθίους_A

<https://bkv.unifr.ch/works/1/versions/2/divisions>

https://www.ccel.org/1/lake/fathers/clement-i_clement_a.htm

https://el.wikisource.org/wiki/Κλήμεντος_προς_Κορινθίους_B

<https://bkv.unifr.ch/works/106/versions/124/divisions/35378>

https://www.ccel.org/1/lake/fathers/clement-ii_clement.htm

Ignacio:

https://el.wikisource.org/wiki/Προς_Εφεσίους_Ιγνάτιος

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-ephesians.htm>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-magnesians.htm>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-trallians.htm>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-romans.htm>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-philadelphians.htm>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-smyrnaeans.htm>

https://el.wikisource.org/wiki/Επιστολή_προς_Πολύκαρπον

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/ignatius-polycarp.htm>

Polikarpo:

https://el.wikisource.org/wiki/Επιστολή_Πολυκάρπου_προς_Φιλιππησίους

<https://bkv.unifr.ch/works/104/versions/120/divisions>

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/polycarp-philippians.htm>

Barnabas:

https://el.wikisource.org/wiki/Επιστολή_Βαρνάβα

<https://bkv.unifr.ch/works/103/versions/117/divisions/34975>

https://www.ccel.org/1/lake/fathers/barnabas_a.htm

Papias (Eusebius, Hist. Eccl.):

<https://bkv.unifr.ch/works/147/versions/363/divisions/122876>

<http://www.perseus.tufts.edu/hopper/text?doc=Perseus%3Atext%3a2008.01.0640>